# «Le Groupe Esperanto du Maine» salutas vin !

*Bonvenigaj vortoj*

*«La unuan fojon kiam ni rigardis la Teron, ni estis miregegitaj. La Tero estas tiel bela vidata de tie supre. Laŭvorte, oni ne povas vidi iujn ajn liniojn, iujn ajn limojn»*

*Sophie Adenot, franca kosmoŝipisto*

**Enhavo**


| | |
|---|---|
| Oni jam delonge konas kialojn … | p. 1. |
| Poezia angulo : | p. 2. |
| Loĝantoj devige evakuitaj | p. 3. |
| 6 Milionoj Trafitaj | p. 3. |
| Loka specialaĵo : anĵua supo | p. 4. |


**Oni jam delonge konas kialojn …**

Ĉiuj akvofluoj de la Alpoj superbordiĝis kaj kaŭzis ruinigegojn. La kialo de ĉi-tiuj inundoj estas konata: ĝi estas nur la montara senarbigo.

Arbaro estas ia filtrilo kiu (kaptas – detenas) pluvakvon kaj kiu reguligas ĝian fluaĵon; sed se iu montaro estas senarbarigita, la akvo malsupreniras sur nudajn deklivojn sen ke io retenas ĝin kaj ĝi rapide ŝveligas la torentojn kiuj subite iĝas terura detrua potenco.

Bulteno de la ĵurasa federacio de la Internacia Laborista Asocio,
**la 9a de aŭgusto 1874**



# Poezia angulo



**Muelilo dum printempo**

Pajlo kaj musko
Verdigas la tegmenton;
Tie klukas kolombo,
Tie trinkas hirundo.
Brako de platano
kaj dika hedero
Kovras la kabanon
Per paca ombro.

La roso pluvere
Brilas ĉe ĉiu branĉeto;
La sunradio viŝas
La akvan polvon;
La vento, kiu skuas
La ondiĝantajn frukarbejojn
Igas ĉe nia vango
Neĝi la printempo.

Sub la mortinta folio,
La bruna najtingalo
Kaŝas sin apud la pordo
Nivele de la grundo.
La infano, kiu kliniĝas,
Vidas en la jasmeno
Ĝiajn ovojn sur la branĉo
Kaj detenas sian manon.

**Alphonse de Lamartine**,
franca poeto, 1790-1869

**Aprilo**

Simone, la suno ridas sur la folioj de hilekso:
Aprilo revenis por ludi kun ni.

Ĝi portas korbojn de floroj sur siaj ŝultroj,
Ĝi disdonas ilin al prunelarboj, al kaŝtanarboj, al salikoj;

Ĝi semas ilin unu post la alia inter la herbo de la pratoj,
Sur la rando de rojoj, de marĉetoj kaj fosaĵoj;

Ĝi rezervas la jonkvilojn por akvo, kaj  la vinkojn
Por boskoj, kie plilongiĝas la branĉoj;

Ĝi ĵetas la violojn ombren sub rubuso
Kie ĝia nuda piedo, sentime, kaŝas  kaj engrundigas ilin;

Al ĉiuj herbejoj ĝi donas lekantetojn,
Kaj primolojn, kiuj havas kloŝetkolierojn;

Ĝi lasas konvalojn fali en arbarojn
Kun la anemonoj, laŭlonge de la freŝaj padoj;

ĝi plantas iridojn sur la tegmento de la domoj
kaj en nia ĝardeno, Simone, kie la vetero estas agrabla

Ĝi disdonos akvilegiojn kaj penseojn,
hiacintojn kaj la bonodoron de keirantoj

***Rémy de Gourmont,*** franca poeto,1858-1915



**Ĉi tie: Loĝantoj devige evakuitaj**

Ne plu estas flualtiĝa alarmo pri la riveroj en la departemento Mayenne tiun lundon la dudek-trian de februaro.

Pasintan semajnon, tri loĝantoj de la vilaĝeto Moulin de Boisseau ĉe Saint-Jean-sur-Mayenne estis devige evakuitaj. Domoj laŭlonge de la haŭlvojo en la urboj Laval kaj Changé estis inunditaj – cetere la haŭlvojo estas barita ĝis ordonŝanĝo. Laŭ Louis Michel, prezidanto de la loka komisio pri akvo, « necesas denove konstrui heĝojn, planti boskojn, fosi fosaĵojn, prizorgi la kamparon, vivigi la grundojn per bona huma strukturo. Necesas ankaŭ plibonigi niajn lokajn urboplanismojn.



Dum printempo loĝi ĉe riverbordo : ĉio kvietas, sed dum vintro tio ne estas same. Antaŭe, oni loĝas apud riveroj ĉar oni ne havis trinkeblan akvon, oni piediris ĝis la rivero por lavi la tolaĵojn, do oni volis akvon proksime kaj hodiaŭ eble estus bone iomete malproksimiĝi.

Ni riskas kiam ni decidas ekloĝi ĉe riverbordo. »



**Tie: 6 Milionoj Trafitaj**

Uragano Melissa, ŝtormo de kategorio 5 kaj unu el la plej potencaj iam registritaj, kaŭzis la morton de almenaŭ 76 homoj en Karibio, inkluzive de 43 en Jamajko kaj ĉirkaŭ 40 en Haitio, post ĝia trairo la 28-an de oktobro, laŭ provizora raporto publikigita de aŭtoritatoj la 4-an de novembro.

Kun ventoj superantaj 250 km/h, Melissa detruis tutajn regionojn de Jamajko, dum Kubo kaj Haitio estis detruitaj pro mortigaj inundoj.

Entute, preskaŭ 6 milionoj da homoj estis trafitaj de ĉi tiu ekstrema vetera evento, kiu difektis infrastrukturon, loĝejojn kaj rikoltojn en ĉi tiuj landoj, laŭ Unuiĝintaj Nacioj.

En Jamajko, preskaŭ 70% de alttensiaj elektrolinioj estas paneintaj, kaj al hospitaloj mankas akvo, fuelo kaj manĝaĵoj, laŭ The Jamaica Star. Dum humanitara plano jam estis disvolvita por Haitio, taksita je 908 milionoj da dolaroj, ĝi estas nur 21% financita, laŭ UN, kiu lanĉis alvokon por internacia helpo.

## Loka specialaĵo : anĵua supo

Anĵua supo estas franca koktelo, tipa en la regiono Anĵuo. Ĝi havas plurajn variaĵojn, kiel ĉampansupo aŭ "Saumur-supo".



**Ingrediencoj**
Malgraŭ la multaj variaĵoj, anĵua supo ofte konsistas el du tipaj produktoj de la regiono:  oranĝa likvoro (40°) kaj ŝaŭmvino "Crémant de Loire". Ĝi ankaŭ enhavas citronan sukon kaj kansukeron.
La uzata likvoro estas ofte "Cointreau", kreita en la urbo Angers.

**Preparo**
- Verŝu kuleregon da citrona suko, kuleregon da kansukero, kaj kuleregon da oranĝa likvoro.
- Verŝu botelon da malvarmigita "Crémant de Loire" en la miksaĵon, poste servu.
- Notu, ke la supo estu preparita lastminute por plej bone konservi la freŝecon de ĉi tiu aperitivo.

**Variaĵoj**
Ĉi tiu koktelo naskis luksan variaĵon nomatan "ĉampansupo".  Temas pri ĉampan-bazita koktelo, kiu anstataŭigas la "Crémant de Loire" origine ĉeestantan en la anĝeva supo.
Ĝi ankaŭ povas esti nomata la "Saumur-supo". Ĉi tiu estas alia variaĵo en kiu la likvoro el Angers estas anstataŭigita per likvoro el Saumur kiel "Combier", kaj en kiu la "Crémant de Loire" estas anstataŭigita per botelo da tre seka Saumur-vino.

Ĝuu modere!

Le G.E.M (Groupe Espérantiste du Maine) a été créé en mai 1991 ouvrant son horizon au département de la Mayenne. Il a modifié récemment son intitulé et se nomme depuis «  Le Groupe Espéranto du Maine ».

La GEM (Majna Esperantista Grupo) estis kreita en majo 1991, vastigante siajn horizontojn al la departemento Mayenne. Ĝi ŝanĝis sian nomon kaj de tiam nomiĝas "La Majna Esperantista Grupo".